72

BIBLIOTEKO
NOVA KULTURO



Petr Dânov

# La Granda Leĝo

I-a jaro № 2

La lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis

Burgas – Bulgarujo

Biblioteko „NOVA KULTURO“

Petr Dânov

# LA GRANDA LEĜO

el la bulgara originalo tradukis: Dian

2

Burgas — Bulgarujo
1928

## Novan vojon ni ekmarŝu!

La nuntempa homaro estas submetita je unu granda turmentado. En ĝia tuta vivo, materia kaj spirita, regas ĝenerala, forta krizo. La granda eŭropa milito kun ĉiuj siaj terurajôoj jam delonge foriris, sed ĝiaj postsekvoj ne nur ne foriris, sed tagon post tago pli kaj pli forte estas senteblaj. Materia kaj spirita mizero regas senlime. Ŝajne, ke super la tuta mondo pendas ia malbona sorto. La popoloj estas forte turmentitaj, ili suferas sub pezega ŝarĝo, kiu ilin premegas. Ili baraktas, maltrankvilaj ili estas, zorgante pri sia sorto. En iliaj animoj bolas io profunda kaj potenca. La milito foriris, sed ĝia spirito ankoraŭ flugpendas super la mondo, ĉiam tiel terura kaj potenca kiel antaŭe.

La homaro malsanas. Ĝi perdis la ĝustan direkton de sia vojo kaj hodiaŭ vagas senvojo. Vane ĝi serĉas elirejon el ĉi-malfacila stato, sed nenie ĝi estas trovebla. Ĉiuj lumantaj iam lumturoj, montrantaj al ĝi la vojon, jam delonge estingiĝis kaj sur ĉi-vojo hodiaŭ regas plena mallumo. La religio, kiu dum ĉiuj historiaj epokoj de la homaro desegnis ĝian vojon, hodiaŭ jam estas en malprogreso. Ĝi estas perdinta la spiriton, konservante nur la formon. Ĝi delonge forgesis la Dileĝojn, servante nur al leĝoj kaj dogmoj kreitaj de ĝi mem. Kaj pro tio ĝi ĉesis esti faktoro en la sorto de la homaro. Hodiaŭ la religio ekzistas nur tradicie. En la animoj de la homoj pli kaj pli eniĝas la fermento de la senkredeco. Ili forgesis Dion kaj Li ĉesis loĝi en iliaj koroj.

* * *

Se ni observos la vivon de la Naturo ni vidos, ke tie regas ĉiama seninterrompa movo. Nenie estas rimarkebla senmovo. Ĉie regas seninterrompa kaj eterna kreado. La evoluo, tio estas unu el la

fundamentaj leĝoj de la Naturo. La malnovaj formoj ruiniĝas kaj anstataŭ ili estas kreataj novaj, pli belaj kaj pli perfektaj. Tiel la vivo, kiu seninterrompe eliras el la Granda Kreinto, konstante evoluas.

La Naturo amas la movon; ĝi ne toleras la senmovon. Ĉiu formo en la Naturo: ĉu ĝi estas kreskaĵo, ĉu besto, homo, astro ktp., se ĝi montras tendencon al movo kaj evoluo, en ĉi-formon la vivo konstante sin enverŝas. Ĝi kreskas kaj konstante evoluas. Kaj male: se ĝi estiĝas senmova, la vivo sin retiras kaj ĝi malrapide mortas.

La sama leĝo validas ankaŭ en la homa vivo. En ĉiu formo de ĉi tiu vivo, ĉu religio, ĉu filozofio, ĉu scienco, arto ktp. devas esti konstanta movo, devas boli vivo, kreado. Kia do estas la kaŭzo? Nur unu sola ĝi estas. Ĝi estas la novo, la nova elemento, kiu devas konstante sin enverŝi en ĉi-formojn ilin vivigi. Por ke estu subtenata la vivo de la organismo, estas necesa nutraĵo, tute same por la subtenado de ĉi-formoj estas necese konstante la novo sin enverŝi en ilin. Kaj kiel post la ĉesigo de la nutraĵo la organismo mortas, tiel same post la ĉesigo de la torento, portanta la novon en la formojn, ili ruiniĝas kaj mortas.

Se ni komparos ĉiujn formojn de la homa vivo, ni vidos, ke la plej konservativa en ĉi-rilato estas la religio. Ĉie alie ni vidas ĉu grandan aŭ malgrandan, sed tamen ian gradon de vivo kaj kreado. Se ni esplorus ekzemple la sciencon, ni vidus, ke en ĝi miloj da inspiritaj homoj dediĉis sian vivon al konstanta, seninterrompa laboro. Ili ŝparas nek klopodon, nek tempon, nek rimedojn. Senlace ili laboras. En ĉiu el ili enprofundiĝis la deziro krei ion novan, enventi iun novan leĝon, iun novan veron kaj per tio doni fortan puŝon al la scienco en ĝia vojo. Kaj ni vidas ke jam malnovaj teorioj cedas al pli novaj, ke malnovaj konceptoj estas ŝanĝataj per novaj: pli pravaj kaj pli lumaj.

Se ni turnas nian rigardon al la filozofio, ankaŭ tie ni rimarkos la saman aferon. La eterne mal-

trankvila kaj senĉese soifanta novajn verojn homa menso, ĉiam marŝas antaŭen. Koncepto koncepton sekvas, teorio teorion ŝanĝas, sed la movo ne ĉesas.

En la arto estas rimarkebla la sama afero. Ankaŭ tie regas senĉesa serĉado de pli novaj kaj pli superaj formoj, per kiuj estu esprimita la belon, la superon, kiu konstante elspruĉas el la homa animo.

Ĉie bolas vivo kaj kreado. Nur en la religioj regas trankvilo kaj silento. En la religioj, iuj principoj unu foje akceptitaj, estas traktataj apokalipsaj, sekve, netuŝeblaj kaj neŝanĝeblaj. Neniu plu kuraĝas perfektigi ilin aŭ enmeti en ili iujn novajn elementojn. Ĝis kie atingis la konservatismo de iuj religioj estas vidate de la fakto, ke ili eĉ ne kuraĝas ŝanĝi la lingvon, en kiu estas skribitaj la libroj de iliaj fondintoj. Oni uzas ĝin ankorau, malgraŭ ke ĝi jam estas mortinta kaj nekomprenebla preskaŭ por ĉiuj. Kaj se iu ekkuraĝas enmeti iun novan elementon en iu religio tuj oni nomas lin herezulo kaj li suportas la plej teruran persekuton.

La historio de la homaro evidentigas unu fakton, ripetata dum ĉiuj jarcentoj. Kiam la aŭtoritato de la religio pereiĝas, ĉiam post tiu aperadis reformanto aŭ, dirite en okulta lingvo, iu Granda Majstro, alportanta al la homoj novan religion. Ĉi Majstro kune kun siaj disĉiploj ĉiam estadis persekutataj de la subtenantoj de la malnova religio. Sed post longaj persekutoj kiam la Majstro jam forlasis la teron kaj liaj disĉipioj sukcesis jam venki kaj altrudi la novan religion, ili baldaŭ forgesas sian pasintecon. Ĝis kiam ĉi-tiu nova religio estis submetita je persekuto, en ĝi vivo kaj kreado bolis, sed post kiam ĝi jam estiĝis reganta, ĉia vivo malaperis kaj ĝi komencis malevolui. Kaj se aperus nova reformanto, la subtenantoj de ĉi religio aplikus la samajn metodojn de persekuto, kiuj estis aplikitaj antaŭe rilate ilin. Ni esploru ekzemple la Kristismon. Ĝis kiam ĝi estis submetita je persekuto, en ĝi estis forta vivo, sed post kiam ĝi estiĝis reganta religio, la vivo malaperis kaj la adeptoj de la Kristismo komencis per-

sekuti ĉlujn nove aperintajn reformantojn. La sama afero estas rimarkebla ankaŭ en aliaj religioj. Malgraŭ ke ĉi-tio estis ripetita milojn da fojoj, tamen la homaro neniam atentigis la sperton de la estinteco.

* * *

Ni revenu al la nuna vivo. En la animo de la nuntempa homo estas ia malpleneco. Nenio lin kontentigas, nek filozofio, nek scienco, nek religio. Li sopiras ion novan, ion realan. Kie li ĝin trovos, kiu donos ĝin al li?

Se li turnos sin al la religio, la predikanto diros al li: Kredu Dion kaj vi estas savota. Sed kion signifas ĉi-vortoj? Kia estas ilia senco? Por ke la homo kredu ion, li devas posedi ian internan percepton, per kiu certiĝi, ke tiel estas, kiel li pensas, malgraŭ ke li sola ne havas sperton.

Laŭ la okultismo unue la homo havis rektan, senperan ligon kun Dio. Tiam Dio estis por li realaĵo. Sed depost kiam la prapatro de la homaro manĝis la frukton de la peko en Edeno, li interrompis ĉi-ligon. Dio ĉesis esti realaĵo por li. Tiam aperis la kredo kaj Dio estiĝis por la homoj objekto de ĉi-kredo. En simila stato sin trovas ankaŭ la nuntempa homo. Por li Dio estas nur ideo en kiu li volas kredi. Jen pro kio, ĉiuj predikoj de la nuntempaj religiaj predikantoj temas unu kaj samon: la kredo al Dio. Sed malgraŭ tio la senkredeco pli kaj pli enprofundiĝas en la animoj de la homoj.

La nova spirita kulturo, kiu nun venas en la mondon, devas meti kiel fundamenton de la tuta homa religia vivo novan principon: — nome, la principon de la Amo al Dio. Nur per ĉi-principo hodiaŭ oni povas konstrui. Ĉiuj ceteraj ekzistantaj principoj estas jam elprovitaj dum la longaj jarcentoj; ili ne donis rezultojn aŭ donis tro malgrandajn. La Amo al Dio estas ĉi potenca impulso, kiu alproksimigas la homan animon al Li; kaj Dio estas la granda kaj eterna Fonto de Amo, Vero, Lumo, Paco kaj Ĝojo por ni. Li estas tiu granda koro, kiu senĉese pulsadas kaj konstante nin amas. Li estas la

Granda Torĉo en nia vivo, kiu ĉiam lumigas nian vojon al la Eterna Idealo. Li estas la Granda Ĝojo por niaj animoj, kiu nin inspiras sur la vojo al ĉi Idealo. Li estas la granda Konsolo por niaj koroj en momentoj de malĝojo kaj turmentoj. Ho! Kiom granda estas Li! Kiom grandaj estas Liaj Agoj. Lia ĉeesto ĉiam vekigas ion plej superan en la koro de ĉiu viva estaĵo. Ĉiuj grandaj animoj dediĉadis al Li la plej grandan Sanktecon en si.

Por la homa animo Dio estas ĉi Granda Suno, de Kiu ĝi ricevas sian vivon. Se ĝi interrompus la ligon kun ĉi-tiu Suno, ĝi velkiĝus, tiel, kiel velkiĝas kreskaĵo senigita de Lumo kaj Varmo. La unika elîrejo el ĉi-malfacila stato por la nuntempa homaro estas la restarigo de ĉi-ligo kun Dio, kun la Fonto de la Vivo. Kaj al tio kondukas nur unu vojo — la vojo de la Amo al Dio.

Dum miloj da jaroj la filozofoj penas koncepti Dion, Lin ekkoni per siaj mensoj, doni difinon pri Li, kiel pri iu ideo, sed vane. Kial? Ĉar ĉi-deziro estas ekster la limoj de la homaj kapabloj. Per ĉi-tiuj limigitaj perceptrimedoj, per kiuj disponas la homo, absolute neeble estas por li ekkoni Dion. Ne povas la limigita formo kompreni la Senlimecon; la forpasema, la provizora formo ne povas kompreni la Eternecon. La rivelita formo ne povas kompreni la nerivelitan Absolutecon. Por ke ni ekkonu Dion en la filozofia senco de la vorto, ĉí tio signifas Li estiĝu objekto de nia kono. Sed tio estas absurdo. Ne povas tiu, kiu nin entenas, en kiu ni vivas, estiĝi objekto de nia kono. Ĉi-tio signifas, ke ni devas eliri ekster Li. Nun la homo povas havi nur unu rilaton al Dio: Lin ami. Lin amu per sia tuta koro, kaj per sia tuta animo, kaj per sia tuta forto, kaj per sia tuta menso. Tion, kion predikis ankaŭ nia granda Majstro Kristo.

* * *

En la jena refero, „La granda leĝo", la Majstro P. Dânov nome traktas ĉi-fundamentan demandon: la Amo al Dio. Laŭ Lia instruo, kiam ĉi

Diamo eniras en la homon, ĝi reformigas entute lian spiritan vivon. Ĝi plivastigas kaj plivarmigas lian koron, lumigas lian menson, plifortigas lian volon, donas sencon al lia vivo, donas al li impulson krei. Per ĝi la homo denove naskiĝas, li estiĝas nobla, grandanima, malavara, kompatema ktp. En lia animo tiam ekĝermas la plej superaj sentoj, en lia menso aperas la plej noblaj pensoj, en lia koro tiam ekbrulas la Sankta Fajro de la Amo. La koro estiĝas templo de ĉi-Amo kaj la Spiritom alsuprenvenas kiel servanto en ĉi-templon. Ĉi-tiu estas la homo de la Nova Kulturo. Kaj kiam ĉiuj homoj akceptos ĉi-veron kaj ĝin aplikos, tiam venos ĉi-kulturo sur la teron. Tiam venos la Regno de la Amo, la Dia Regno en sia tuteco sur la teron, kaj ĉiuj homoj estos civitanoj de ĉi-Regno kaj servantoj al Dio de la Amo.

Ho! Kia ĝojo pleniĝas niajn animojn, kiaj noblaj kaj superaj sentoj elŝprucas el niaj koroj, kia potenco aperas en ni, nur pensante pri la alveno de ĉi tago.

Ho! Majesta tago de la Regno de la Amo, venu pli baldaŭ! Venu kaj varmigu niajn korojn, venu kaj klerigu niajn mensojn, venu kaj alportu en niajn turmentitajn animojn la ĝojon. Venu, ni atendas vin kun vibrantaj koroj. Ni sopiras vin. Venu, venu. . . . . .

Okcidenten ni vidas la estingantajn lastajn radiojn de la subiranta malnova kulturo, kulturo de la egoismo, malico, perforto kaj peko. Ĝia lasta tago venis, ĝi foriras.

Tie, orienten ni vidas la unuajn radiojn de la aperanta Nova Kulturo! Ho! Kiel ĉarma, majesta kaj bela ĝi estas! Entute brilanta kaj lumradianta ĝi venas por alporti al la homaro la Dian Amon. Ĝi venas alporti al la turmentita homaro: feliĉon, pacon, ĝojon, eternan belecon kaj eternan harmonion. Animoj de la Amo, leviĝu, venu ni ĝin renkontu, ĝi venas. . . .

Ni ekmarŝu la Novan Vojon! Ni ekmarŝu la Vojon de la Amo al Dio. Ni eklaboru pri la aperanta Nova Kulturo. Ni estiĝu ĝiaj kreintoj. Ĝi jam venas.

Ni ekmarŝu la Novan Vojon!

D-ro K. N. Paskalev

Burgas, Aprilo 1928.

# La Granda Leĝo

„Ekamu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro, kaj per via tuta animo, kaj per via tuta forto, kaj per via tuta menso; kaj vian proksimulon kiel vin mem".

L u k o: 10; 27.

La nuntempa homaro solvas multe da gravaj problemoj, sed ĝi ankoraŭ ne trafis la plej gravan problemon, la plej gravan taskon, kiun ĝi devas solvi — oni disputas pri ĉi-tio. Nun oni solvas la ekonomian problemon, la problemon pri la pano, pensante ke ĝi estas la plej grava. Tiel estas, sed mi demandas: La problemo pri la pano, kiun oni milojn da jaroj solvadas, ĉu ĝis nun estas solvita? Ĝin oni solvas provizore, po parte kaj finfine ĝi restas ĉiam nesolvita. Iuj diras, ke la plej grava problemo solvenda estas tiu pri la eduko. Kaj vere, la homoj milojn da jaroj sin edukas, sed ĉu la problemo estas solvita? Ne, ankaŭ ĝi ne estas solvita. Aliaj diras, ke ĉiu ŝtato devas esti forta, potenca, devas havi fortan armeon por kontraŭstari al la malamikoj. Tiel estas, sed kiu estas la ŝtato, kiu per sia forto solvis la problemon pri sia ekzistado? Montru al mi ŝtaton, ekzistantan de antaŭ du — tri miljaroj? Ĉiuj ĝis nun ekzistintaj ŝtatoj atingadis sian apogeon kaj malaperadis. Sekve, en la mondo estas unu grava problemo, kiu ankoraŭ ne estas solvita. Ĝi estas nek popola, nek socia, nek problemo por

la kleruloj. La popoloj, la sociagantoj, la kleruloj havas multe da problemoj pri kiuj sin okupi. Sed la plej grava tasko kiun oni devas solvi, estas tiu pri la homa animo, aŭ pri la homa spirito, sed ne pri la homa menso, ĉar la homo estas io pli ol la menso. La menso estas servisto de la spirito. La koro, la volo estas ankaŭ servistoj de la spirito. La homo laŭ sia origino, laŭ sia naturo estas io granda! Se vi komprenas la homon, se vi kredas lin, sed ne lian eksteran rivelacion, vi vidos kiom granda, kiom supera li estas. Ĉu vi nomos homo la komerciston, kiu vendas al vi ŝtofon? Ĉu vi nomos homo la profesoron, kiu instruas en la lernejo kaj samtempe rilatas al vi malĝentile, aŭ — la patrinon, kiu abortas sian 5-6 monatan embrion kaj ĝin forĵetas, aŭ — la patron, kiu profitas sian filon, aŭ — la reganton, kiu kreas malsaĝajn leĝojn?

Ni devas difini, kio estas la homo. Oni diras, ke la homo estas pensi-povanta estaĵo. Ne, li estas io plia. Sekve, ne estas difinebla precize en la mondo tio, kio estas granda kaj supera. La plej grava problemo en la mondo, kiu okupas la scienculojn, estas tiu pri la supera konscia vivo. Vi diros ke ĉi vivo estas subtenata de la lumo, de la varmo, de nutraĵo, vestaĵo ktp. Vivo, kiu devenas de la varmo ne estas vivo. Ĝi estas la energio, kiu bezonas subtenon. La vivo mem portas ĉi aĵojn. Kiam ĝi venos, ĝi alportos kun si la lumon, la varmon, la nutraĵon; ĝi mem alportos sian vestaĵon. La vivo estas io potenca, kiam ni ĝin komprenos.

Ni atentigas la verson: „Ekamu la Eternulon vian Dion, per via tuta koro, kaj per via tuta animo, kaj per via tuta forto, kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem". Kial? — Ĉar la origino de ĉi-tiu granda vivo, pri kiu ni parolas, estas la Amo. Iuj demandas: kio estas la Amo? — La Amo estas la fonto de ĉi-tiu vivo, kiu fonto portas lumon, varmon, nutraĵon, vestaĵon kaj forton — ĉion ĝi portas en si mem. Tiel oni difinas

la vivon ankaŭ per sperto. Pri tiuj, kiuj solvis tiamaniere la problemon, en la Sankta Skribo estas dirite: „La eterna vivo estas tio — ekkoni Vin, la solan veran Dion!" Sub la vorto Dio ni ne komprenas ian eksteran estaĵon, kiun la homoj povas adori, sed sub ĉi vorto ni komprenas la fonton de la vivo, la Eternecon, kiu povas riveliĝi ĉe ni. Ĉi tio pruvas, ke la Eterneco povas sin riveli en formo. Sekve, ni, la homoj de la mondo, kiel rivelacio de ĉi-Eterneco solvas unu grandan taskon — la Eterna vivo sin rivelu en limigita formo. Por ke la vivo sin manifestu, ni devas posedi sciojn, saĝon, kiuj kreos harmoniajn rilatojn inter la homoj.

Nun ĉiuj homoj konfesas, ke koncerne la problemon pri la vivo ekzistas disputo. Ni diras, ke nenia disputo ekzistas. Ĉar la atributoj de la vivo estas racio, lumo, varmo ktp. Se tiel staras la afero, ĉu povas esti disputo? Se estas disputo, la vivo ne estas racia. Ĉiuj homoj same konceptas la vivon kaj ĝin deziras. Ĉiuj konfesas la Amon kaj ĝin deziras, sed kiam? — Dum ili estas junaj, ili konfesas la Amon; sed kiam ili maljuniĝas, ili ĝin rifuzas. En la Amo sin trovas la jena leĝo: kiam vi ekamas iun objekton aŭ personon, ĝi ekhavas valoron. Kial? — Ĉar vi povas ami nur ĉi-objektojn, kiuj portas en si mem la vivon. Kaj ĉiu objekto, kiu portas en si mem la vivon, ekhavas valoron. Ekaminte kion ajn, vi zorgas pri ĝi, vi gardas ĝin. Kiam vi ekamos iun amikon, vi skribas al li leterojn, parolas al li afable. Kiam vi forlasos lin, vi lin forgesos. Kio estas la Amo? — La Amo estas forto, kiu pligrandigas la homon, kiu donas al li impulson. Iuj diras, ke homo enamiĝinta jam ne lernas. Ĉi-tio ne estas vera. La Amo portas impulson por scioj. Homo, kies koro ardiĝas, lernas kaj laboras. Iuj diras, ke la Amo faras la homojn senatentaj. Tio, kio neatentemigas la homojn, ne estas Amo. Ne estas Amo tio, kio igas la lupon formanĝi la ŝafon. Ne estas Amo tio, kio igas la homon ŝteli ies

monon aŭ forpreni la grenkampon de sia najbaro. La homo, akirinta la Amon, ne nur valorigas la aĵojn, sed lia koro plivastiĝas kaj li estiĝas malavara. La monujo de tiu, kiu amas, estas malfermita kaj li similas fonton, kiu konstante elŝprucas. Li ne similas barelojn, en kiuj estas vino, kiun oni konstante mezuras, kiom elfluis kaj kiom restis. Li similas fontanon, kiu konstante fluas kaj neniam ĉesas. Se vi similas fontanon, la Amo jam venis en vin. Se vi povas vidi la bonon en ĉiuj, se vi povas vidi la sencon de la aferoj, ekrigardante ĉielen, vi jam estas apud la pordego de la granda Dia vivo, kaj la Amo jam estas veninta en vin.

Mi parolas al vi pri granda scienco, kiu havas sian fundamenton en vi mem. Vi posedas spertecon akiritan de la vivo kaj mi opinias, ke tiel estas. Ĉu vi rekonas ĉi-tion aŭ ne, estas alia demando. Vi estas venintaj multfoje sur la tero en diversaj formoj. Ĉu vi memoras tion aŭ ne, ĉu vi ĝin konfesas aŭ ne, ĝi estas enskribita en la kronikoj de la naturo. Kion vi kredas, tio ne gravas; gravas tio, kion notis la naturo. La homo multe da fojoj eliradis el Dio kaj revenadis al Li. Tiel estas skribite. Kia estas via kredo, estas via propra afero, ĉar ĉiuj estaĵoj havas sian kredon. Ne gravas tio — en kio ni kredas, sed la vera problemo por ni estas tiu pri la Amo. Ni solvas la plej gravan demandon. En la leĝo de la Amo, ĉiu nobla penso, ĉiu nobla deziro aŭ sento devas esti plenumita, sendiference, ĉu ĉi-tio koncernas patrinon, patron aŭ infanojn — la leĝo estas unu kaj sama por ĉiuj. Ni devas montri al la mondo, ke ni portas en ni mem la grandan Dian vivon, ke Dio vivas en ni kaj ke ni devas vivi kiel Li. Ni volas servi al Li, ĉar ni kredas, ke ĉion de Li ni akiris.

Kristo diras: „Ekamu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro, kaj per via tuta animo, kaj per via tuta forto, kaj per via tuta menso, kaj vian pro-

ksimulon kiel vin mem". Sekvas do, ke la homo devas pleniĝi per la Diamo. Iuj diras, ke ekaminte ili ne povas plu labori. Ne, nome tiam la vera laboro venos en la mondon. Nun estas nur peno, sed ne laboro. La vera laboro estas unu granda tasko por la venonta generacio, por tiuj grandaj animoj, kun kiuj oni ne disputos, ĉu ekzistas postmorta vivo aŭ ne. Ili estas la animoj, kiuj solvos la problemon pri la vivo. Se vi demandos similan homon, ĉu li konas vin, li diros al vi: venu morgaŭ vespere gaste ĉe mi. Vi iros ĉe li, li regalos vin, interparolos kun vi kaj poste disiĝante li diros al vi: venu ĉe mi kiam vi bezonas ion. Ĉi-tio estas stimulo en la mondo. Kion ajn la homo posedas, li devas ĝin oferi. Nun la homoj havas malpravan opinion pri la ofero. Ili pensas, ke ĉiu oferaĵo, farita de ili, pereos. Nun mi klarigos al vi, kio estas la grenero. Se la grenero sin ne oferos, falante kaj mortante en la tero, kia estos la stato de la terkulturisto? La mortinto, la oferinto fordonas sian forton kaj ĝi pligrandiĝas. Ĉi-tio estas unu el la ecoj de la ofero. Iuj scienculoj diras, ke oni ne devas oferi, al neniu oni devas doni kion ajn. Tio signifas, ke neniu devas semi, ke neniu devas plugi. Ne, ni semos, ni plugos, sed racie. Sekve, ni devas havi solidan bazon en la vivo. La fakto, ke vi estas bulgaro, scienculo aŭ ke vi havas novajn konceptojn pri la vivo, tio ne povas esti bazo. L a v e r a b a z o e s t a s l a A m o k a j ĝ i e s t a s l a v i v o. Ĉ i-t i u n v i v o n n i p o s e d a s, s e d ni ĝ i n a n k o r a ŭ n e r i v e l i s.

Mi donos al vi unu ekzemplon el la tempo de Zinobius, egipta faraono. Dum lia regado la leĝoj en Egiptujo estis tro severaj. Ĉiu krimulo estis kondamnata je morto. Unu el la eminentaj adeptoj de la „Blanka Frataro", nomita Eŝua Bentam, estis sendita en Egiptujon fari sian ekzamenon. Li devis solvi la jenan taskon: li trovu racian rimedon, per kiu li plifaciligi la staton de ĉi-tiuj homoj, mortpunataj pro la plej malgranda krimo. Solvonte la taskon, li devas reveni en la Blankfratara Skolon kaj

raporti kiamaniere li solvis ĝin. Dum ĉi-tio tempo la filino de la faraono malsaniĝis pro nekuracebla malsano kaj Eŝua Bentam iris ĉe la faraono dirante al li: „Mi povas resanigi vian filinon, sed mi volas unu komplezon de vi". Zinobius respondis: „Mi estas preta fari ĉion". — „Mi volas, ke vi ordonu al ĉiuj viaj subuloj alportadi al mi ĉiujn krimulojn, kondamnitaj laŭ la leĝo je mortigo per detranĉo de iliaj manoj, piedoj aŭ per eligo de iliaj okuloj ktp. En simila stato oni alportadu ilin al mi". Eŝua Bentam resanigis la filinon de la faraono kaj la faraono ordonis: „Ĉiuj krimuloj kondamnitaj je mortigo, post la plenumo de la kondamno, estu alportataj al Eŝua Bentam". Kaj oni komencis porti ilin, unu post alia, en lian ĉambron. Eŝua Bentam konis la legojn de la revivigo kaj revivigadis ilin, redonadis al ili la sanon, ŝanĝante iliajn vizaĝojn kaj dirante al ili: „Nun foriru kaj al neniu rakontu pri la okazintaĵo". Ĉiuj ĉi-homoj estiĝis liaj disĉiploj kaj postsekvis lin. — La homo, kiu portas la Amon en si mem, devas povscii alĝustigi la kapojn de la homoj, iliajn piedojn kaj manojn. Li devas relokigi la okulojn kaj la korojn de la homoj. Niaj pensoj, niaj sentoj, niaj mensoj kaj niaj koroj devas esti alĝustigitaj!

Sekve, la dubo, kiu ekzistas inter la nuntempaj homoj, devas malaperi kaj kiam ili sin renkontas, ili kredu unu la alian. Kiam vi min renkontos post kelke da jaroj, ne estu trovebla en miaj pensoj, sentoj kaj agoj kia ajn kontraŭdiro kaj vi estu pretaj oferi ĉion por Dio. Dio estas la plej konata, la plej supera en la mondo. Tiu estas Dio, la Dieco en ni, Kiu igas nin admiri la belon en la mondo, Kiu puŝas nin al la supero, al noblo. Tiu mallaŭta voĉo, kiu parolas en ni, estas Dio. Ĉi-tiu milda voĉo parolas en ĉiuj. Kiom da fojoj vi bedaŭras, ke vi ne obeis ĉi-Voĉon kaj pro tio vi pekis. La Dia voĉo en ni neniam parolas kiel tondro, sed milde; kaj foje, kiam ni pekas, ĝi diras: „Ne ĉagreniĝu, estas rimedoj, per kiuj oni povas ripari la malbonon". Iam ni ne volas cedi ion. Tiam la milda voĉo el interne diras:

donu, cedu ĝin! Mi, la saĝa homo, kiu vidas formikon sur la vojo, mi devas cedi al ĝi. Mi ne devas ĝin piedpremi. Ĝi eĉ ne supozas, ke ia grandega estaĵo alproksimiĝas al ĝi, sed mi, kiu vidas ĝin devas deflankiĝi. Sekve, Dio, Kiu vidas ĉiujn niajn bezonojn kaj mankojn de volpovo, ekintencis rebonigi la mondon. La mondo ne restos sen ŝanĝo, ĝi estas rebonigota, sed vi devas provi kaj akcepti ĉi instruon. Ĝuu la ĝojon kaj vi solvos unu el la plej gravaj problemoj, kiu vin okupas. — Amu la Eternulon per via tuta koro! Kiam vi ekamos Dion, la Eternulon, vi neniam perdos, Li ĉiam parolos al vi kaj via vizaĝo akiros neordinaran lumon.

Do, mi diras: ni ĉiuj devas ami Dion. Nur tiam nia vivo akiros sencon. Kaj tiam Dio instruos nin kiamaniere ami, kaj vi ekamos vian proksimulon, kiel vin mem. Tio estas la plej granda arto. Por ke ni lernu ami, Dio devas enloĝi en ni, ĉar ni ne estas Amo, sed Dio estas Amo; ni ne estas Vivo, sed Dio estas Vivo. Li instruos nin, kiel ni devas ami kaj vivi. Nun de ni oni postulas, ke ni amu nian Disinjoron per nia tuta koro, kaj per nia tuta animo, kaj per nia tuta forto, kaj per nia tuta menso. Ĉi-tio estas la plej facila arto, kiun ĉiu el vi povas ellerni. Vi eble kontraŭdiros: mi atendos ankoraŭ iom, mi trastudos iujn filozofiojn kaj poste mi vidos. Milojn da filozofaj sistemoj vi povas trastudi, sed ankaŭ en ili tiu-ĉi problemo ne estas solvita. Ekamu Dion kaj jen ĝi estas solvita! Tio signifas: vi amu ĉion en la mondo, por ke vi povu kompreni, ke ĉio en ĝi estas racia en sia rivelacio. Ekrigardante la stelojn kaj la sunon, via koro, via tuta estaĵo ektremu. Sed vi kiel konsideras la sunon? Iuj ĝin konsideras kiel fajran globon. Mi vidas ĉiumatene Dion, prenanta la sunon kiel grandan, lumantan kandelon, ĉirkaŭiri kun ĝi ĉien. Li eliras el oriento. Tiel mi vidas la sunon. Malantaŭ la suno estas io pli granda. Ankaŭ malantaŭ nia vivo, laŭ la sama maniero, estas kaŝita io granda. Malantaŭ ĉi-tiu ordinara rivelacio de la vivo estas io alia, kion ĉiu

el vi konscias. Ĉi tio estas la Dieco en la homo. luj min demandas: kiun Dion vi kredas? Ni kredas ĉi-Dion, Kiu estas Amo, Vivo, Lumo kaj Varmo. Ni kredas je tiu Dio, Kiu ne bezonas ke ni servu al Li laŭ ekstera maniero, sed ĉi-Dio volas, ke ni manifestu Lian Amon ekstere. Li volas, ke Lia Amo trapasu nin tiel, kiel la akvo trapasas la tertavolojn kaj sin filtras por eliri sur la supraĵon pura. Li volas, ke ni ĉiuj portu la Diamon. Se ni permesos al la Diamo trapenetri nin, ni havos la Dibenon, ni havos Lian konfidon kaj ni ĉiuj nomos nin Diaj filoj. Kio pli bela ol tio — esti Diaj filoj? Kio pli bona ol tio — vivi laŭ Dio?

Jen unu el la plej gravaj problemoj, kiun oni devas solvi. Post kiam vi solvos ĉi-problemon, vi eniros en la mondon kaj vi lernos. Antaŭ vi staras granda, profunda scienco, sed unue vi devas akiri la Eternan Amon, la Eternan Vivon, ekkoni Dion, ekkoni la Eternan Veron en ĝia tuteco.

* * *

El la refero de la Majstro farita je la 11. X. 1925.

Sinelles Sinner

# Estonta Bulgarujo

(Elcitoj el korespondaĵo)

. . . Se mi devas diri kelke da vortoj pri Bulgarujo — pri la vera morgaŭa Bulgarujo — tio koncernas nek la politikajn partiojn, kiuj svarmas ĉie, nek la multajn, rapide aperantajn sportajn kaj aliajn organizaĵojn imite la okcidenteŭropajn landojn, nek la imiton de diversaj fremdaj ideoj, per kiuj ankaŭ ĉe ni oni spekulacias.

La morgaŭa Bulgarujo, laŭ ni, estas ĉi-originala idea movado, kiun oni nomas ordinare „D â n o v i s m o" aŭ pli prave „U n i v e r s a l a B l a n k a F r a t a r o". Ĝi estas movado, kiu entute similas nubon: granda, kiam vi ĝin observas, ne sentebla — kiam vi sin trovas en ĝi, perdanta siajn konturojn en la vivo — kaj tamen ĉiam viva, potenca, nevideble efikanta en ĉiuj branĉoj de la vivo. Laborante senbrue, sen trumpetoj kaj tamburoj, ĝi direktas efektive multe da okazintaĵoj, ne nur en la bulgara historio kaj socia vivo, ĝi delonge transpasis la limojn de la malgranda Bulgarujo, sed ankaŭ impulsigas multe da personoj, institutoj, Frataroj kaj Socioj en Eŭropo. Sen ĵuro pri fideleco, ĝiaj membroj estas pli fidelaj ol ĉiuj konspirantoj rilate la sekretojn — sed iliaj sekretoj estas pli prave sekretoj de vivaj kasoj, al kiuj estas fiditaj fremdaj trezoroj kaj ili gardas ilin fidele. Ĝi estas socio, en kiu mankas statutoj, legitimaĵoj, kondiĉoj por akcepto de membroj, formalaĵoj, balotoj ktp.; — Frataro en kiu oni povas multe vidi kaj ankoraŭ pli multe ellerni, — kaj ne tiom de ĝiaj materiaj akiraĵoj ol de

la internaj transformigoj de la homoj, kiuj ĝin formas. Kaj vere, ili estas blindaj, kiuj ree komencis vidi, lamaj, kiuj ekmarŝis, mortintoj — kiuj reviviĝis — ne nur en simbola, sed ankaŭ en efektiva senco de la vorto. Ili estas homoj el ĉiuj klasoj de la socio — apud la bela, fama artistino staras iu lavistino, — apud la kortega sinjorino staras iu vangosta vilaĝanino, kiu plugas la teron por gajni sian ĉiutagan panon; — apud la oficiroj, advokatoj, kuracistoj staras laboristoj ktp. Tie vi vidas malsovaĝigitajn lupojn kaj leonojn, humiligitajn kiel ŝafidojn — iamajn anarĥistojn, kiuj pacience kulturas la ne tiom grandajn fratarajn ĝardenojn kaj en laboro kaj rezonado serĉas la grandan Vojon de la Vivo. Unu bieno apud Sofio kaj multe similaj en la provinco, kie oni vivas laŭ la patriark-komunaj principoj, donas simpletan bildeton de la materiaj akiritaĵoj de ĉi tiu granda, laŭ siaj ideoj, movado, kiu laŭ sia profundeco kaj amplekso superas ĉion similan, ĝis nun ekzistanta, almenaŭ tiom, kiom mi scias. Sed la efektiva valoro de ĉi tiu movado konsistas ne nur en la ideoj, kies portanto ĝi estas, of en la nevenkebla tendenco ĉi-ideoj estu realigitaj kaj en la neŝancelebla kredo ke ili povas esti aplikitaj en ĉiu vivo, dum ĉiu tempo, se ne entute, almenaŭ po parte, de ĉiu animo kiu eksentis la kontakton kun la Viva Naturo.

Ĉiuj ĉi impulsoj kaj ĉi kredo havas sian vivan fonton en la aŭtoritato de la Majstro, Gvidanto de ĉi-Frataro — la vera fonto de forto, saĝo, Amo, kiu ampleksas kaj impulsigas ĉi-malsaman vivan materialon kaj puŝas ĝin facile kaj nerimarkeble al la realigo de ĉiuj Dítaskoj en la vivo. Vera kosmopolito laŭ sia kompreno kaj vivo P. Dânov, la Majstro de ĉi-Frataro estas bela, spiranta bonon figuro, ĉirkaŭita nimbe per blanka hararo kaj barbo. Lia vizaĝo kaŝas ion neordinaran; ŝajne ia apenaŭ videbla lumo lumigas lian figuron. Liaj trajtoj spiras neordinaran trankvilecon, liaj okuloj estas vivaj kaj penetremaj; sed ofte ankaŭ ili enprofundiĝas dum koncentriĝo, kaj tiam vi vidas, ke antaŭ vi staras

nur unu Granda Spirito, profunde koncentrigita en si mem. Antaŭ 25 jaroj ĉi tiu homo, filo de bulgara pastro *), mem firme kredanta, post sufiĉe longa studado medecinon kaj filozofion en Usono, li revenis Bulgarujon kaj komencis siajn predikojn. Sed antaŭ tio li zorge trastudis la fizikan grundon de sia spirita kampo — esplorante kelkdekmiloj da homaj kapoj frenologie, kiun sciencon, ŝajne, li konas fundamente, sed ne tiel, kiel oni ĝin komprenas okcidente. La modeste komencita movado per persona ekzemplo kaj ŝajne nerimarkeble, hodiaŭ ĝi disvastiĝis en granda movado kun miloj da adeptoj en Bulgarujo kaj en ĉiuj najbaraj landoj kaj ankaŭ ĉe ni. La persona ĉarmo, kiun ĉi-homo vekigas, la sekretajn fortojn, kiujn li posedas kaj pri kiuj miloj da homoj atestas, ĉio ĉi desegnas la fortan ligon, kiu alogas kaj interligas la homojn, enrigardintaj de pli proksime. Kaj al tiuj, kiuj eniras en iliajn Skolojn estas malkaŝataj la senlimaj vastaĵoj de la scio. Ŝajnas, ke en tiuj Skoloj aŭ klasoj, kiel oni ilin nomas, oni instruas ĝeneralajn kaj ankaŭ specialajn sciojn, kiuj multe helpas, por ke la homoj en ĉi socio sin distingu unu de alia laŭ sia celo, agemo kaj vivmaniero. Ĉiuj ili estas vegetaranoj kaj abstinenculoj — ĉi tio estas la principo, per kiu ili komencas, eĉ sen paroli pri ĝi; kaj multe el ili manĝas nur fruktojn. Ili opinias, ke la korpo estas esprimo de la vivo mem, kaj ke la pura penso devas sin riveli en pura korpo. Pura penso, puraj sentoj, puraj agoj, sincera celo al persona perfektiĝo, senprofitema helpo al la kolektiva vivo; sincera amo al ĉio viva — Diamo, kiel ĝin nomas ilia Majstro — estas la karakteraj trajtoj de tiuj, kiuj ekmarŝis la vojon de ĉi instruo. En ĉi instruo, kiel ankaŭ en aliaj instruoj, estas homoj kun diversgradaj komprenoj kaj

---

*) Kiu pastro malfermis la unuan bulgaran lernejon kaj eklezion dum la turka jugo, ĉar ĝis tiam en la lernejoj kaj en la eklezioj oni instruis kaj predikis greke.

konscioj. Unuj sekvas sian Majstron, ĉar li sanigis ilin de diversaj malsanoj kaj kriplaĵoj — ili estas sufiĉe multe; aliaj — ĉar serĉas la veron; triaj — ĉar ili ricevas altan saĝon, kiun li abunde prezentas al ili.

La instruo de la Majstro P. Dânov estante mem profunda filozofia sintezo, ŝajne ne okupas sin per kia ajn religio. Observante ĉiujn religiojn de ilia pozitiva flanko, li traktas ilin kiel valoran akiritaĵon de la homaro. Sed parolante pri la Kristismo, li traktas ĝin kiel fundamentan direktantan ideon, per kiu li alkondukas siajn aŭskultantojn sur la suprojn de la penso, kie oni povas paroli pri la alta Saĝo, Vero kaj Amo. En ĉi okazo, ofte sen sia deziro, li kunpuŝiĝas kun la limigitaj komprenoj de la oficiala eklezio kaj pro tio antaŭ kvin jaroj estis kunvenita eklezia kongreso por proklami lin . . . ekskomunikiĝinta! Ne komprenante lian simbolan lingvon, la ekleziuloj ofte elcitas iuj el liaj pensoj, kunmetante ilin kun la siaj, por fari konkludon tute malan . . . Sed kiel ajn, oni povas kun certeco diri, ke ĉi movado estas la plej potenca idea movado en Bulgarujo, kvante kaj kvalite. Ĝiaj adeptoj estas homoj kuraĝaj el ĉiuj klasoj de la socio; kiel ĉiuj novkredantoj, iam ili estas iom ekscentraj, sed ĉiam kun unu morala nivelo, kiu superas tiun de la ceteraj, kaj garantias ilian sukceson; mem la Majstro parolas, ke scio estas nur tio, kio povas esti aplikita — ĉio alia estas balasto. — La bonaj edifaj normoj, rimedoj por la plibonigo de la vivo kaj la veraj realaj celoj sin levi super la ordinara, ĉiutaga vivo, estas elmontritaj en multe da prelegoj — parto el ili estas presita en 8 grandaj volumoj, multe da lekcioj, parto el kiuj estas presitaj en 6-7 grandaj volumoj, kaj multe da aliaj libroj kaj revuoj („Grenero", „Universala Kroniko" ktp.)

La 25-jara seninterrompa laboro de la Majstro Dânov, la konstanta alveno de novaj homoj, kun freŝaj fortoj, senkuraĝigitaj de la politika kaj socia vivo de Bulgarujo, la aktiva, malgraŭ kaŝita agemo de ĉi-homoj en ĉiuj klasoj de la socio; la centraligo

de la fortoj de veraj ideaj homoj kun unu konstanta spirita evoluo kaj impulso, kaj la senforteco de la ordinaraj politikaj partioj forigi la pezegajn vivkondiĉojn; plej poste ĉi tiu ĝenerala malaltigo de la socia moralo — kutima postsekvo de la militoj por ĉiuj popoloj — ĉio ĉi aldonas grandan valoron al ĉi movado kiel potenca kreanta forto, donanta valoron al ĉiuj aliaj, proksimaj al ĝi movadoj (Vegetarismo, tolstoismo ktp.), suprenigante ilin ĝis la grado de decida faktoro en la politika kaj socia vivo de Bulgarujo kaj per tio eble ili donos puŝon kaj ekzemplon al la ceteraj landoj kaj popoloj.

Tradukis el la angla lingvo
La malgranda Frato

———

## Biblioteko „NOVA KULTURO“

En la aŭroro de la alproksimiĝanta tago de la Nova Kulturo, ni, fruevekiĝintaj infanoj de la nova vivo, faras nian unuan paŝon al la lumradianta idealo, kiu brilas malproksime antaŭ ni.

Ni estu kerno de la nova vivo, ni estu la grundo en kiu ekĝermos la semo de la Nova Kulturo, jen la celoj de nia agado. Kaj ni vokas ĉiujn, en kies animoj brilas la suno de la Alta Idealo, ĉiujn, kiuj esperas kaj atendas la grandan Tagon de la Dia Regno sur la tero — ni unuiĝu! kaj mano en mano „ni iru la vojon signitan“ al la pacigita, unuiĝita nova homaro.

Por ni ne ekzistas apartaj religioj, por ni ne ekzistas apartaj nacioj, partioj kaj sektoj, — por ni ĉiuj estas fratoj, ĉiuj estas filoj de Dio.

Ni apartenas al neniu sekto, ni amas ĉiujn kaj estimas iliajn opiniojn. La ideojn, kiuj entuziasmigas niajn animojn, ni disvastigas ne sentante bezonon batali kontraŭ kiu ajn. — Ĉar ni al neniu estas malamikoj.

Por subteni nian laboron, ni aranĝis fondon „Nova Kulturo“ invitante ĉiujn simpatianoj subteni ĝin. Ĉiu subtenanto de la fondo ricevas senpage ĉiujn niajn eldonojn.

## Fondo „Nova Kulturo“

| | |
|---|---|
| de la antaŭa N-ro . | 1490 |
| X. *** . . . . . . . . . . . . . . | 1000 |
| M. Kraev, Orehovo . . . . . . . . . . | 60 |
| K. Sugarev. vil. Ajvadĵik . . . . . . | 60 |
| Z. Burgas . . . . . . . . . . . . . | 100 |
| R. S. Ivanov, Burgas . . . . . . . . | 60 |
| (daŭrigota) bulg. lv. | 2770 |

## Biblioteko „NOVA KULTURO"

(sub la aranĝo de redakcia komitato)
dum sia unua jaro donos la jenajn numerojn:

1. LA ALTA IDEALO — parolado de la Majstro Petro Dânov, kun Lia portreto kaj antaŭparoloj de Mara Belĉeva kaj de D-ro K. N. Paskalev.
2. LA GRANDA LEĜO — de P. Dânov.
3. KIUJ KAJ KIAJ ESTAS LA BLANKAJ FRATOJ? — de St. Vatralski.
4. LA REVEKIĜO DE LA KOLEKTIVA KONSCIO — de P. Dânov.
5. LA NOVA HOMARO — de P. Dânov.
6. LA UNIVERSA KAJ LA KOSMA AMO — de P. Dânov.
7. LA NOVA VIVO — de P. Dânov.
8. LA MALLARĜA VOJO — de P. Dânov.

9, 10. LA FORTOJ DE LA VIVA NATURO — de Petro Dânov.

**Jarabono:** por Bulgarujo 40 levoj; por fremdlando — 3 sv. fr. aŭ ĉiu egalvaloro. Al varbinto de 5 abonantoj estas sendota unu jarkolekto senpage. Aparta numero 0.40 sv. fr. aŭ egalvaloro.

**Adreso:** Atanas Nikolov, str. „Car Iv. Ŝiŝman", 19 — Burgas — Bulgarujo.

ĴUS APERIS:

**Benito Mussolini**

# LA ANTIKVA ROMO SURMARE

PREZO LIT. 8.

La tuta profito de la eldonaĵo estas destinita al porinfana bonfaro

Mendojn al la Esperanto-Eldonejo A. Paolet
S. Vito al Tagliamento (Italia)

Ĵus aperis:

# KOMERCA VORTARO EN ESPERANTO

DE

R. KREUZ kaj A. MAZZOLINI
Membroj de Lingva Komitato

ARANĜITA LAŬ METODO DE KABE

— Prezo it. lit. 12 tolbindite —

Mendojn al la Esperanto-Eldonejo A. Paolet
S. Vito al Tagliamento (Italia)

## BIBLIOGRAFIO

En tiu ĉi loko ni koncize raportos pri ĉiuj al ni po duekzemplere alsenditaj libroj, gazetoj ktp. Verkoj en aliaj lingvoj estas ankaŭ akceptataj.

*

OOMOTO — monata gazeto, organo de la spirita movado „Oomoto“ en Japanujo, kies fundamentaj principoj estas tre proksimaj kun tiuj de nia instruo. Adreso: Oomoto Propaganda Oficejo — Kameoka, Kioto-fu, Japanujo. Jarabono 4.80 sv. fr.

Hispana Esperantisto — ilustrita monata gazeto, aldono al la Hispana Esperanto Biblioteko. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. Glorieta de Bilbao, 5, Madrid.

Bulgara Esperantisto — organo de la Bulgara Esperantista Asocio. Aperas monate. Adreso: Poŝtkesto № 233, Sofio, Bulgarujo. Jarabono: 1.50 sv. fr.

Ligilo por vidantoj — oficiala informilo de Universala Asocio de blindaj esperantistoj. Adreso: Harald Thilander, Stokholm, Svedujo.

Akademia pro Interlingua; Adr.: Cavoretto — Torino, Italujo. Interlingua, Coquina Vegetale, k. a.

Esperanto-presejo „Nova Kulturo" — Sevlievo